

Léon Denis

La kialo de l' vivo

FEB

La Kialo de l' Vivo

RACIA SOLVO
de la
PROBLEMO DE L' EKZISTADO

Kio ni estas.
De kie ni venas.
Kien ni iras.

DE

LÉON DENIS

Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL e GRÁFICO
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040
Rio de Janeiro, RJ – BRAZILO

1ª. eldono en Esperanto

5.000 ekzempleroj

Titolo de la franca originalo:
LE POURQUOI DE LA VIE

Kovrilo de João Guilherme Andery Tayer

El la franca lingvo tradukis Esperanten
AFFONSO SOARES

80 – AA; 001.5 –O; 2/1982

Copyright by
FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
(Brazila Spiritisma Federacio)
SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte
Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

Kompostado, fotolitografio kaj ofset-preso de
Presejo de la Eldona Fako de FEB
Rua Souza Valente, 17
20941-040 – Rio de Janeiro – RJ – Brasil
*C.G.C. nº 33.644.857/0002-84 IE. nº 81.600.5*03

PRESITA EN BRAZILO
Impresso no Brasil

TABELO DE LA ENHAVO

Prezento 11

Al la suferantoj 15

I – Devo kaj libero 17

II – La problemoj de la ekzistado 19

III – Spirito kaj materio 21

IV – Harmonio de l' Universo 24

V – La sinsekvaj ekzistadoj 27

VI – Justeco kaj progreso 29

VII – La superega celo 35

VIII – Eksperimentaj pruvoj 37

IX – Resumo kaj konkludo 42

PREZENTO

Estas tute nenecese prezenti al la ĝenerala brazila legantaro la aŭtoron de tiu ĉi libro, la francan verkiston Léon Denis. Sed ĉar tiu ĉi esperantlingva eldono sin destinas memkompreneble ankaŭ al tutmonda publiko, tial ni ne povas ne fari almenaŭ mallongan prezenton de la homo kiu, pere de didakta metodo, plej multe kontribuis, dum 50 jaroj de sia vivo, por la disvastigo de la Spiritisma Doktrino.

Léon Denis naskiĝis en la franca urbo Foug, jurisdikcio de Toul, la 1an de Januaro 1846, kaj forpasis en Tours, la 12an de Aprilo 1927, en la aĝo de 81 jaroj.

Li estis samtempulo de Allan Kardec, la Kodiginto de Spiritismo, kies verkaron li komencis studi jam en sia junaĝo.

Pro la graveco de siaj libroj kaj la alta moraleco de sia vivo ĉiam dediĉita al la studado kaj disvastigado de la Doktrino de la Spiritoj, Léon Denis estas nomata La Apostolo de Spiritismo.

Dotita per brila talento kaj neordinara kapablo profunde esplori ĉiujn fenomenojn de la Naturo, li povis krei verkon imponan pro la riĉeco de gravaj informoj sciencaj, filozofiaj, historiaj kaj precipe moralaj. Super la mirindaj paĝoj de liaj verkoj ŝvebas ia dolĉa, diafana

lumo de estuziasmo kaj raviteco,naskita de lia senmezura amo al la Naturo, al la Vivo kaj al ĉio lin ĉirkaŭanta. Ĉiuj liaj verkoj, eĉ tiuj, en kiuj estas pritraktitaj la plej altpensaj kaj subtilaj temoj, estas aŭtentaj poemoj en prozo, dank'al la poezia ligvaĵo, kiu vestas liajn ideojn.

El la titoloj mem de liaj libroj oni povas konkludi, ke la verkaro de Denis prezentas vastegan panoramon de la filozofio, de la scienco kaj de la ĝenerala kulturo de la epoko de la aŭtoro.

Pro tiuj kvalitoj kaj ankaŭ pro la beleco de sia stilo, tiuj libroj ĉiam okupis elstaran lokon en la biblioteko de seriozaj studemuloj el pluraj landoj. En Brazilo, speciale, la edifaj instruoj de la Apostolo de Spiritismo, ĉiam bazitaj sur la evangeliaj lecionoj de Amo kaj Frateco kaj sur la plej aktualaj sciencaj esploroj, alportis netakseblan kontribuon al la formado de la unuaj generacioj de eminentaj spiritistoj.

Ni prezentas ĉi-sube la titolojn de la verkaro de Léon Denis:

— *Doktrina kaj Praktika Sintezo de Spiritualismo.*
— *La Granda Enigmo.*
— *Johana Dark, mediumino.*
— *La Kelta Genio kaj la Nevidebla Mondo*
— *La Kialo de l' Vivo.*
— *Kristanismo kaj Spiritismo.*
— *En la Nevideblo.*
— *La Nevidebla Mondo kaj la Milito.*
— *Post la Morto.*
— *La Problemo de la Estaĵo kaj de la Destino.*

— SPIRITOJ KAJ MEDIUMOJ.
— SPIRITISMO KAJ LA KONTRAŬDIROJ DE LA KATOLIKA EKLEZIO.
— LA TRANSTOMBO KAJ LA SUPERVIVO DE LA ESTAĴO.

La Brazila Spiritisma Federacio jam de tre longe prenis sur sin la taskon disvastigi la verkaron de Léon Denis pere de majstraj tradukoj en la portugalan lingvon. Nun, tiu respekteginda organizaĵo daŭrigas sian serion de esperantlingvaj eldonoj, prezentante al la publiko ĉi tiun gravan verkon en majstra traduko de la kompetenta samideano Affonso Borges Gallego Soares.

La enhavo de LA KIALO DE L' VIVO estas esence filozofia kaj morala. Tiun ĉi libron la aŭtoro dedićis al la suferantoj, asertante, ke ĝi estas frukto de liaj maldormoj, meditoj kaj esperoj, de ĉio, kio konsolas kaj subtenas lin ĉe tiu ĉi vojirado.

Ni esperas, ke per tiu ĉi eldono BSF komencos la publikigon de la tuta serio de libroj de Léon Denis en la internacia lingvo de Zamenhof.

Monte Aprazível, la 27an de Majo 1981.

BENEDICTO SILVA

AL LA SUFERANTOJ

Al vi, ho miaj fratoj kaj fratinoj en humaneco, al vi ĉiuj, kurbigitaj sub la vivoŝarĝo kaj afliktitaj de pezaj luktoj, angoroj kaj elprovado, mi ja dediĉas ĉi tiujn paĝojn. Mi ilin verkis, celante ja vin, afliktitojn kaj neniohavulojn de tiu ĉi mondo. Humila batalanto por la vero kaj la progreso, mi metis en ilin la fruktojn de miaj maldormadoj, pripensoj kaj esperoj, ĉion, kio min konsolis kaj subtenis dum mia surtera irado.

Dio volu, ke en ili vi trovu utilajn instruojn, iom da lumo por prilumi al vi la vojon. Povu ĉi tiu modesta verko esti por via malĝoja spirito tio sama, kiel ombro por sunbruligita laborulo, kiel freŝa, klara fonto por soifa vojaĝanto en seka dezerto!

I

DEVO KAJ LIBERO

Kiu homo, en siaj horoj de silento kaj enpensiĝo, ne demandis la Naturon kaj sian koron pri la sekreto de la aferoj, la kialo de la vivo, la pravo de ekzisto de l' Universo? Kie estas tiu, kiu ankoraŭ ne penis koni siajn destinojn, levi la mortvualon, scii ĉu Dio estas fikcio aŭ realo? Ne ekzistas tiu homo, kiel ajn indiferenta li estas, kiu ankoraŭ ne alfrontis tiujn konsternajn problemojn. La malfacileco trovi ilian solvon, la mallogikeco kaj plureco de la rezultintaj teorioj, la bedaŭrindaj sekvoj de la plimulto el la konataj sistemoj nur konsistigas konfuzan tutaĵon, kiu tedas la homan spiriton kaj lin puŝas al indiferenteco kaj skeptikeco.

Sed la homo bezonas scii; li bezonas la lumon, kiu klarigas, la esperon, kiu konsolas, la certecon, kiu lin gvidas kaj subtenas. Li ja havas la rimedojn por koni la veron, la eblecon vidi ĝin eliĝi el la mallumo kaj priverŝi lin per sia bonfara lumo. Por tio li devas forlasi la antaŭjuĝajn sistemojn, funde esplori sin mem, aŭskulti tiun internan voĉon, kiu sin turnas al ĉiuj senescepte kaj kiun la sofismoj ne povas falsi: la voĉon de la prudento, la voĉon de la konscienco.

Tiele mi faris. Dum longa tempo mi pripensis; mi primeditis la problemojn de la morto kaj de la vivo kaj persiste sondis ties profundajn abismojn. Al la Eterna Saĝo mi direktis ardan preĝon, kaj la Eterna Saĝo elaŭdis min, same kiel Ĝi elaŭdas ĉiun spiriton posedita de la amo al la bono. Pruvoj evidentaj, faktoj rekte observitaj konfirmis la konkludojn de mia rezonado, liveris solidan, neskueblan bazon al mia konvinko. Post dubo, mi kredis; post neado, mi vidis. Kaj paco, fido, morala forto falis sur min. Jen la bonoj, kiujn, kun sincereco de la koro, kun la deziro esti utila al miaj proksimuloj, mi proponas al tiuj, kiuj suferas kaj malesperas.

Neniam la bezono de lumo fariĝis tiel forta, kiel nun. Radikala transformiĝo efektiviĝas en la sino de la homaj socioj. Submetita dum pluraj jarcentoj al la principo de aŭtoritateco, la homo aspiras ĉiam pli kaj pli al libereco kaj memregado. Samtempe kiel ŝanĝiĝas la politikaj kaj sociaj institucioj, la religiaj kredoj, la fido al la dogmoj malvigliĝas; la kultoj estas forlasataj. Ankaŭ en ĉi tio kuŝas unu el la sekvoj de la aplikado de libero al la aferoj de la konscienco kaj pensado. Libero, en ĉiuj siaj kampoj, emas anstataŭi perforton kaj aŭtoritatecon kaj gvidi la naciojn al novaj horizontoj. La rajto de kelkiuj fariĝis la rajto de ĉiuj; sed por ke tiu suverena rajto regu konforme al la justeco kaj produktu siajn fruktojn, necesas, ke ĝian uzadon reguligu la konado de moralaj leĝoj. Por ke libero estu fruktodona, por ke ĝi liveru solidan, temporezistan bazon al la homaj verkoj, necesas, ke ĝi estu kompletigita de la lumo, la saĝo kaj la vero. Ĉu libero, en la manoj de malkleruloj kaj malvirtuloj, ne same efikus, kiel potenca armilo en la manoj de infano? Tiuokaze la armilo ofte turniĝas kontraŭ la portanto kaj vundas lin.

II

LA PROBLEMOJ DE LA EKZISTADO

Antaŭ ĉio gravas scii, kio ni estas, de kie ni venis, kien ni iras, kiaj estas niaj destino. La ideoj, kiujn ni faras al ni pri la Universo kaj ties leĝoj, pri la rolo, kiun ĉiu el ni devas ludi sur tiu ĉi vasta scenejo, estas ja gravegaj, ĉar ĝuste laŭ tiuj ideoj ni starigas nian konduton, la celon de nia vivo, al kiu celo ni nepre marŝas. Jen la bazo, la vera instigilo de ĉia civilizacio. **Kia la idealo, tia la homo**. Tiel por la kolektivoj, kiel ankaŭ por la individuo, la konceptado de la mondo kaj de la vivo precizigas la devojn; ĝi difinas la irendan vojon, la prenendajn rezoluciojn.

Sed, ni jam diris, la malfacileco solvi tiujn problemojn kaŭzas, ke oni ofte flankelasas ilin. La opinio de la plejmulto estas malfirma, duboplena, kaj tio nepre influas la agojn kaj la karakterojn. Jen la malbono de la nuna epoko, la kaŭzo de la ĝin reganta konfuzo. Ekzistas ja la inklino al la progreso; oni volas iri, sed kien? Neniu sufiĉe pensas pri tio. La homo, nescianta pri siaj destinoj, similas la vojaĝanton, kiu maŝine iradas sian vojon, nesciante ties punktojn de deiro kaj alveno, eĉ nesciante la kialon de sia vojaĝo, de kio sendube rezultas lia emo halti ĉe la plej malgranda obstaklo kaj tiel perdi sian tempon, malzorgante pri la atingenda celo.

La malpleneco, la malklareco de la religiaj doktrinoj, la ekscesoj, kiujn ili naskis, ĵetas en materialismon multajn spiritojn. Oni emas kredi, ke ĉio finiĝas kun la morto, ke la destino de la homo estas forneniiĝi en la vakuo.

Pli forte ni rezone elpruvos, kiel tiu ĉi kredo estas rekte kontraŭa al la racio kaj eksperimentado. Ni diru

jam nun, ke ĝi estas kontraŭa al ĉia nocio pri justeco kaj progreso.

Se la vivo estas limigita inter lulilo kaj tombo, se la perspektivoj de la senmorteco ne klarigas al ni la ekzistadon, tiam neniu alia leĝo povas gvidi la homon, krom tiu diktata de liaj instinktoj, apetitoj kaj plezuroj. Ne gravas, ĉu li amas la bonon, la justecon. Se lia rolo en la mondo estas nenio alia ol aperi kaj malaperi; se li kunportas en forgeson siajn esperojn kaj korinklinojn, tiam li des pli suferos, ju pli puraj kaj noblaj estos liaj aspiroj; amanto de la justeco, defendanto de la rajto, li rigardos sin kondamnita neniam vidi ties plenumiĝon; entuziasma amanto de la progreso, sentema por la suferado de siaj similuloj, li kredas, ke li estingiĝos antaŭ ol li vidos triumfintaj siajn principojn.

Kun la perspektivo de l' nenio, la vivo estos des pli riĉa je amaraĵoj kaj elreviĝoj, ju pli oni praktikos abnegacion kaj justecon. Egoismo bone komprenata estus do la superega saĝo; la ekzistado perdus sian tutan indon kaj grandecon. La plej noblaj fakultoj kaj inklinoj de la homa spirito velkadus ĝis kompleta estingiĝo.

La neado de la estonta vivo ankaŭ forigas ĉian moralan sankcion. Tiel ĉia ago, bona aŭ malbona, krima aŭ nobla, kuntrenas la samajn sekvojn: nenian kompenson al tiuj ekzistadoj mizeraj kaj humilaj, al subpremado kaj doloro; ne plu esperon por la afliktitoj, konsolon en la surtera elprovado. Nenia diferenco, en la estonteco, inter la egoismo, kiu nur por si vivis, ofte je la kosto de siaj similuloj, kaj la martiro, aŭ la apostolo, kiu, suferante, pereis en la batalo por la emancipiĝo kaj progreso de la homaro. Ilin englutos la sama obskuro.

Se ĉio finiĝas kun la morto, tiam la homo havas nenian motivon por sin deteni, subpremi siajn instin-

ktojn kaj apetitojn. Ekster la sociaj reguloj, nenio povas lin bridi! Bono kaj malbono, justo kaj maljusto egaliĝas, fordisiĝas en la nenion, kaj memmortigo estos ĉiam rimedo por eskapi el la rigoro de la homaj leĝoj.

La kredo pri la nenio ne nur detruas ĉian moralan sankcion, sed ankaŭ lasas sen solvo la problemon pri la malegaleco de la ekzistadoj en tio, koncernanta la diversecon de la fakultoj, kapabloj, situacioj kaj meritoj. Efektive, kial unuj estas dotitaj per ĉiuj kapabloj de la spirito kaj la koro, favorataj de la sorto, dum aliaj nur havas intelektan malriĉecon, malvirtojn kaj mizeron? Kial en unu sama familio parencoj, fratoj, naskitaj el la sama karno, esence diferencas laŭ tiom da vidpunktoj? Jen demandoj nesolveblaj tiel por la materialistoj, kiel ankaŭ por multe da kredantoj. Sed ni ilin mallonge ekzamenos ĉe la lumo de la racio.

III

SPIRITO KAJ MATERIO

Ne estas efiko sen ia kaŭzo; la nenio ne povas produkti ion. Jen aksiomoj, t.e. nekontesteblaj veraĵoj. Nu, ĉar ja ekzistas en ĉiu homo potencoj, fortoj, kiuj ne povas esti rigardataj kiel materiaj, necesas serĉi ilian originon en alia fonto ekster la materio, nome en tiu principo konata kiel animo aŭ Spirito.

Kiam, malsuprenirante en la fundon de la animo, ni volas lerni kiel koni nin mem, analizi niajn fakultojn; kiam tiun animon ni senbalastigas je la ŝaŭmo, kiun la vivo amasigis sur ĝin, kaj ni forskuas de nia intelekto la dikan envolvaĵon el antaŭjuĝoj, eraroj kaj sofismoj – tiam ni eniras la plej kaŝajn angulojn de nia memo kaj troviĝas antaŭ tiuj noblaj principoj, sen kiuj ne

estus grandeco en la homaro: la amo al la bono, la sento de justeco kaj progreso. Tiuj principoj, kiuj en diversaj gradoj troviĝas tiel en la malklerulo, kiel ankaŭ en la genio, ne povas deveni de la materio, ĉar tiajn atributojn ĝi ne posedas. Kaj se ĝi ilin ne posedas, kial ĝi sola povus formi estaĵojn havantajn tiajn ecojn? La sento pri la belo kaj la vero, la admiro, kiun ni spertas ĉe la grandaj kaj noblaj faroj, havus tiel la saman originon, kiel la karno de nia korpo kaj la sango en niaj vejnoj. Ni tamen devas ilin rigardi, kiel rebrilojn de pura, superega lumo, brilanta interne de ĉiu homo, same kiel la Suno rebrilis en la akvoj, ĉu ili estas klaraj aŭ ne. Vane oni pretendus, ke ĉio estas materio! Kiel do! Ni sentas potencajn strebojn al la amo kaj la bono, ni amas la virton, la sindonon, la heroecon; en ni estas gravurita la sento pri la morala beleco; la harmonio de la leĝoj kaj aferoj nin ravas kaj penetras; kaj nenio el ĉio ĉi distingus nin de la materio? Ni sentas, ni amas, ni havas konsciencon, volon, prudenton; kiel do ni devenus el kaŭzo, kiu posedas tiajn ecojn en nenia grado; kiu nek sentas, nek amas; kiu konas nenion; kiu estas blinda kaj muta! Estante superaj al la kaŭzo, kiu nin kreis, ni ja estus pli bonaj, pli perfektaj ol ĝi.

Tia vidmaniero ne eltenas ekzamenon. La homo havas duoblan naturon. Laŭ la korpo kaj ties organoj li devenas el la materio; laŭ siaj intelektaj kaj moralaj kapabloj li devenas el la Spirito. Rilate al la homa korpo ni pli ĝuste aldiru, ke la organoj formantaj tiun mirindan maŝinon similas al radoj, kiuj ne povas moviĝi sen ia motoro, sen ia funkciiga volo. Tiu motoro estas la animo. Tria elemento ilin ambaŭ kunligas, transsendante al la korpo la komandojn de la penso. Tiu elemento estas la perispirito: etereca materio, neperceptebla por niaj

sentumoj. Ĝi envolvas la animon, kiun ĝi akompanas en ties senfinaj migradoj kaj al kiu, per plipuriĝo kaj progresado, ĝi liveras vaporecan, diafanan korpon. Ni pritaktos pli poste la ekziston de tiu perispirito, ankaŭ nomata fluideca duoblaĵo. (*)

La Spirito vivas en la materio, kiel arestito en karcero; la sentumoj estas kvazaŭ fendoj, tra kiuj la Spirito komunikiĝas kun la ekstera mondo. Sed dum la materio frue aŭ malfrue senfortiĝas kaj diseriĝas, la Spirito tamen fariĝas pli potenca kaj pli forta per edukado kaj sperto. Liaj aspiroj pligrandiĝas, plu daŭras en la transtombo; lia bezono scii, koni, vivi ne havas limojn. Ĉio ĉi montras, ke la homa estaĵo nur kelkatempe apartenas al la materio. La korpo estas ne pli ol pruntita vestaĵo, pasema formo, ia instrumento per kiu la animo daŭrigas en tiu ĉi mondo sian puriĝadon kaj progreson. La spirita vivo estas la normala, vera, senfina vivo.

(*) De kelke da jaroj certa skolo penas anstataŭigi la dualismon de la materio kaj de la spirito per la teorio de l' unueco de la substanco. Por tiu skolo materio kaj spirito estas diferencaj statoj de unu sama substanco, kiu tra eterna evoluado plipuriĝas, rafiniĝas, fariĝas inteligenta kaj konscia. Ni ne funde pritraktos ĉi tie tiun demandon, kio postulos pli longan elvolvon, sed necesas rekoni, ke la ideo, kiun oni ĝis nun faris pri la materio, estis erara. Dank'al la eltrovoj de Crookes, Becquerel, Curie, Lebon, la materio nun montriĝas al ni sub tre subtilaj statoj, kaj en tiuj statoj ĝi posedas senfine variajn proprecojn. Ĝia ŝanĝiĝemo estas ekstrema. Ĉe certa grado da maldensiĝo ĝi ŝanĝiĝas en forton. G. Lebon povis diri, kun ŝajna pravo, ke la materio estas ne pli ol densiĝo de la forto, dum la forto estas diseriĝinta materio. Sed restas ankoraŭ nura hipotezo dedukti el tiuj faktoj, ke en difinita momento de sia evoluado la forto fariĝas inteligenta kaj konscia. Por ni ekzistas inter la esto kaj la ne-esto ia laŭesenca diferenco. Aliflanke, la monismo de Haeckel, malakceptante ĉe la homa spirito ian vivon sendependan de la korpo kaj repuŝante ĉian nocion pri la postvivo, logike enfluas en la samajn konsekvencojn de la pozitivisma materialismo kaj meritas la samajn kritikojn.

IV

HARMONIO DE L' UNIVERSO

Post kiam demonstriĝis la ekzisto en la homo de ia principo inteligenta kaj racia, la interligado de la kaŭzoj kaj ties efikoj metas nin, por klarigi ĝian originon, sur la vojon al la fonto, de kiu ĝi devenas. Tiu fonto, en la malriĉa kaj neesprimebla homa lingvo, estas nomata Dio.

Dio estas la centro, el kiu emanas kaj kien revenas ĉiuj potencoj de l' Universo. Li estas la fokuso, el kiu radias ĉia koncepto pri justeco, solidareco kaj amo; la komuna celo, al kiu sin turnas ĉiuj estaĵoj, ĉu konscie, ĉu senkonscie. Ĝuste el niaj rilatoj kun la granda Arkitekto de la mondoj rezultas la universala harmonio, la unueco, la frateco. Por ke ni vere estu fratoj, estas necesa la ekzisto de komuna patro, kaj tiu patro povas esti nur Dio.

Certe oni diros, ke la sektuloj prezentas Dion kun aspektoj tiel strangaj, kelkfoje tiel malamindaj, ke la moderna spirito sin deturnis de li. Sed kion valoras la disrezonado de la sektuloj? Pretendi, ke Dio povas esti malaltigita de la homa volo samvaloras kiel diri, ke la Monto Blanka kaj la Himalajo povas esti ŝancelitaj de moskita blovo. La vero, blindige brilega, ŝvebas tre alte super la teologiaj malklaraĵoj.

Por vidi tiun veron, la penso devas liberiĝi el la malvastaj scioj, el la vulgaraj praktikoj; ĝi devas forĵeti tiujn maldelikatajn formojn, per kiuj certaj religioj envolvis la superegan idealon. La penso devas koni Dion en la majesteco de liaj verkoj.

En la tempo, kiam ĉio ripozas, kiam la nokto estas diafana kaj la silento etendiĝas super la dormanta Tero, tiam, homo, mia frato, levu vian rigardon kaj kontemplu la senfinan ĉielon!

Observu la ritman iradon de la astroj evoluantaj en la profundaĵoj. Tiuj nekalkuleblaj fajraj fokusoj estas aliaj mondoj, kompare kun kiuj la Tero estas nenio alia ol atomo; miregindaj sunoj, kiujn rondiras sekvantaroj el sferoj, kaj kies rapida movo mezuriĝas per milionoj da mejloj en minuto. Teruraj distancoj disigas ilin de nia mondo, kaj ĝuste tial ili ŝajnas al ni nuraj lumaj punktoj. Sed direktu al ili tiun kolosan lornon de la Scienco, la teleskopon. Tiam vi distingos iliajn supraĵojn, similajn al fajraj oceanoj. Vane vi penos kalkuli ilian nombron; ili multobliĝas ĝis plej foraj regionoj kaj iom post iom kunfandiĝas en luman polvon. Rigardu al la mondoj najbaraj al la Tero kaj vidu la konturojn de iliaj valoj, montoj kaj maroj, la moviĝon de iliaj nuboj. Konstatu, ke ĉie montriĝas la manifestado de l' vivo kaj ke admirinda ordo kunigas, sub samaj leĝoj, por komunaj destinoj, la Teron kaj ties fratojn, la planedojn vagantajn en la senfino. Sciu, ke ĉiuj mondoj, loĝataj de aliaj homaroj, moviĝas, foriĝas, alproksimiĝas, en diversaj rapidoj, laŭirante grandegajn orbitojn; ke ĉie la moviĝado, la aktiveco kaj la vivo montriĝas en grandioza spektaklo. Observadu ankaŭ nian planedon, la Teron, tiun patrinon, kiu ŝajnas diri al ni: via karno estas mia karno: vi estas miaj idoj. Observu tiun grandan nutristinon de la homaro; rigardu la harmonion de ĝiaj konturoj, la kontinentojn, kie la nacioj naskiĝis kaj kreskis, la vastegajn oceanojn en konstanta moviĝado; sekvu la renoviĝadon de la sezonoj, kiuj ĝin vestas per verdaj ornamoj kaj orkoloraj rikoltoj; rigardu ĉiujn vivajn es-

taĵojn, kiuj loĝas sur la Tero: birdojn, insektojn, bestojn, vegetaĵojn, florojn, kaj vidu, ke ĉiu el ili estas mirinda verko, gemo el la dia juvelujo. Observu vin mem; rigardu la admirindan funkciadon de viaj organoj, la miregindan kaj kompleksan mekanismon de viaj sentumoj. Kiu homa genio povus imiti tiajn delikatajn majstroverkojn, kiaj la okuloj kaj la oreloj?

Primeditu ĉiujn ĉi aferojn kaj demandu vian racion, vian juĝkapablon, ĉu tiom da beleco, brilegeco kaj harmonio povas rezulti el la hazardo, aŭ ĉu oni ne devas pli ĝuste ĉion atribui al la agado de ia kaŭzo inteligenta, prezidanta en la ordo de la mondo kaj en la evoluado de l' vivo. Kaj se vi, kontraŭdire, alludas la malfeliĉegojn, la katastrofojn, fine ĉion, kio perturbas tiun mirindan ordon, mi responde diras al vi: Profunde esploru la problemojn de la Naturo, ne haltu sur la supraĵo, malsupreniru ĝis la plejprofundo de la aferoj, kaj vi malkovros, kun surprizo, ke tiuj ŝajnaj kontraŭdiroj vere konfirmas la ĝeneralan harmonion, ĉar ili ĉiuj estas utilaj al la progreso de la estaĵoj, la sola celo de la ekzistado.

Se Dio, aplombe replikas kelkaj materialistoj, faris la mondon, kiu do faris Dion? Jen malsaĝa kontraŭdiro. Dio ne viciĝas en la ĉeno de siaj kreitaĵoj. Li estas la Universala Estaĵo, senlima en la tempo kaj la spaco, kaj tial senfina kaj eterna. Ne povas ekzisti alia estaĵo supera aŭ egala al Li. Dio estas la fonto kaj la principo de ĉia vivo. En Li unuiĝas, ligiĝas kaj harmonias ĉiuj individuaj fortoj, kiuj, sen Li, izoliĝus kaj diverĝus. Forlasitaj al si mem, regataj de nenia leĝo, de nenia supera volo, tiuj fortoj estus produktintaj nur konfuzon kaj ĥaoson. La ekzisto de ĝenerala plano, de komuna celo, en kiuj partoprenas ĉiuj potencoj de l' Universo, pruvas la ekziston de ia superega intelekto, kiu estas Dio.

V

LA SINSEKVAJ EKZISTADOJ

Ni diris, ke por klarigi al si la estontecon, la homo devas antaŭ ĉio lerni kiel koni sin mem. Por entrepreni sekuran marŝon estas necese scii, kien oni iras. Nur konformigante sian agadon al la superaj leĝoj la homo efike laboros por sia pliboniĝo kaj la pliboniĝo de la socio. Gravas do distingi tiujn leĝojn, difini la devojn, kiujn ili trudas al ni, antaŭvidi la sekvojn de niaj agoj.

Kiam la homo konvinkiĝos pri la grandeco de sia misio, li pli bone scios liberiĝi de ĉio, kio lin malaltigas kaj malfortigas; tiam, sciante sin regi pli saĝe, li preparos per siaj klopodoj la fruktodonan unuiĝon de la homoj en unu grandan fratan familion.

Sed kiel malproksime ni staras de tiu stato! Kvankam la homaro antaŭeniras sur la vojo de la progreso, tamen oni povas diri, ke la grandega plimulto de la homoj iradas tra la vivo, kiel en malluma nokto, sciante nenion pri si mem kaj pri la reala celo de la ekzistado.

Densa mallumego vualas la homan prudenton. La radioj de la vero trafas ĝin jam palaj, malfortaj, senpovaj por klarigi la kurbajn vojojn iratajn de la multenombraj marŝantaj legioj, kaj ne sukcesas lumbriligi antaŭ ili foran kaj idealan celon.

Nesciante sian destinon, ŝanceliĝante senĉese inter autaŭjuĝo kaj eraro, la homo kelkfoje malbenas la vivon. Kurbigita sub ties jugo, li kulpigas siajn similulojn pri la elportataj suferoj, kiuj, preskaŭ ĉiam, estas kaŭzitaj de lia neantaŭzorgemo. Ribelema kontraŭ Dio, kiun li akuzas pri maljusteco, li kelkfoje, en sia frenezeco kaj malespero, eĉ forkuras el la edifa batalo, el la sola lukto,

kiu povas fortikigi lian animon, klarigi lian juĝadon, prepari lin por pli altrangaj laboroj.

Kial ĝuste tiel? Kial la homo malsupreniras, malforta kaj senarma, sur tiun grandan arenon, kie li sin fordonas, senhalte kaj senripoze, al senfina, giganta batalo? Certe tial, ĉar la terglobo estas malsupra ŝtupo en la hierarkio de la mondoj. Sur ĝi loĝas nur komencantaj Spiritoj, t.e. animoj, ĉe kiuj ekestiĝas la racio. La materio regas superege sur la mondo. Ĝi kurbigas nin sub sia jugo, limigas niajn fakultojn, bridas niajn impulsojn al la bono, niajn aspirojn al la idealo.

Tiel, por distingi la kialon de la vivo, por ekvidi la superegan leĝon, kiu regas la animojn kaj la mondojn, estas necese, ke oni sciu liberiĝi el la maldelikataj influoj, el la materiaj zorgoj, el ĉiuj aferoj pasemaj kaj ŝanĝiĝemaj, kiuj vualas nian spiriton kaj malklarigas nian juĝadon. Nur leviĝante, per la penso, super la horizontoj de la vivo, abstraktante tempon kaj spacon, iel ŝvebante super la bagatelaĵoj de la vivo, ni povos ekvidi la veron.

Per strecĥo de la volo, ni momente forlasu la Teron kaj leviĝu ĝis tiuj eksterordinaraj altaĵoj. Tiam malvolviĝos antaŭ ni la grandega panoramo de la sennombraj epokoj kaj senlimaj spacoj. Kiel la soldato, kiu meze de la batalo nur vidas tumulton ĉirkaŭ si, dum la generalo, kies rigardo ampleksas ĉiujn okazaĵojn de la batalo, kalkulas kaj antaŭvidas la rezultatojn; kiel la vojaĝanto, perdiĝinta sur la intermontaj vojoj, povas, suprenirante la monton, rigardi ilian grandiozan tutaĵon, tiel la homa spirito, de super la altaĵoj, kie li ŝvebas, malproksime de la surteraj bruado kaj mizeroj, malkovras la universalan harmonion. Kio ĉi malsupre ŝajnis al li kontraŭdira, neklarigebla, maljusta, tio de alte fariĝas harmonia kaj klara; la vojaj kurbaĵoj rektiĝas; ĉio unuiĝas, kunĉen-

iĝas; al la ravita spirito montriĝas la majesta ordo reganta la kuron de la ekzistadoj kaj la iradon de l' Universo.

De tiuj lumaj altaĵoj, la vivo ne plu estas antaŭ niaj okuloj – kiel ĝi estas por la plimulto – ia vana serĉado de pasemaj ĝuoj, sed ja rimedo por intelekta pliboniĝo, morala plialtiĝo; ia lernejo, kie oni lernas la dolĉecon, la paciencon, la devon. Kaj por esti profita, tiu vivo, ne povas esti ununura. Ekster ĝiaj limoj, antaŭ kaj post la morto, ni vidas, kvazaŭ en duonlumo, malvolviĝi multego da ekzistadoj, tra kiuj, per laborado kaj sufero, ni iom post iom konkeris niajn kvalitojn, nian malgrandan scion; kaj tiel ni konkeros ja tion, kio mankas al ni: perfektan prudenton, senmankan sciencon, senfinan amon al ĉio vivanta.

La senmorteco, simila al senfina ĉeno, malvolviĝas por ĉiu el ni en la vasteco de l' tempoj. Ĉiu ekzistado ligiĝas, per la estonteco kaj la estinteco, al aliaj ekzistadoj malsamaj kaj distingiĝaj, sed solidaraj inter si. La estanteco rezultas el la estinteco kaj preparas la estontecon. Iom post iom la estaĵo kreskas kaj plialtiĝas. Faranto de sia propra destino, la homa spirito, libera kaj respondeca, elektas sian vojon, kaj se tiu vojo estas malbona, tiam liaj faloj kaj la ŝtonoj kaj dornoj, kiuj lin vundos, disvolvos lian sperton, fortikigos lian naskiĝantan prudenton.

VI

JUSTECO KAJ PROGRESO

La superega leĝo de l' Universo estas la senĉesa progreso, la supreniro de la estaĵoj ĝis Dio, fokuso de la perfektaĵoj. El la profundaj abismoj de la vivo, tra senfina vojo kaj konstanta evoluado, ni alproksimiĝas al

Dio. Interne de ĉiu animo kuŝas la ĝermo de ĉiuj fakultoj, de ĉiuj potencoj, kiujn ĝi devas fruktigi per siaj klopodoj kaj laborado. Laŭ tiu ĉi vidpunkto, nia progreso kaj estonta feliĉo estos ja nia verko. Ne plu nepotismo. La justeco disradias sur la mondo; se ĉiuj luktis, se ĉiuj suferis, ĉiuj saviĝos.

Same montriĝas ĉi tie, laŭ sia tuta grandeco, la bezono de doloro, ties utileco por la progreso de la estaĵoj. Ĉiu globo, ruliĝanta en la spaco, estas vasta laboratorio, kie la spirita substanco estas senĉese prilaborata. Kiel la kruda mineralo, sub la agado de la fajro aŭ de la akvo, iom post iom transformiĝas en puran metalon, tiel la homa animo, sub la pezaj batoj de la doloroj, aliiĝas kaj fortikiĝas. La grandaj karakteroj hardiĝas en la elprovado. La doloro estas la superega purigilo, la fornego, kie fandiĝas ĉiuj malpuraj elementoj, kiuj nin makulas: la fiereco, la egoismo, la indiferenteco. Ĝi estas la sola lernejo, kie plipuriĝas la sensaĵoj, kie oni lernas kompaton kaj la stoikan rezignacion. La voluptaj ĝuoj, katenante nin al la materio, malfruigas nian plialtiĝon, dum sinofero kaj abnegacio pli frue liberigas nin el tiu dika tavolo, preparante nin por novaj etapoj, por pli alta supreniro. La animo, purigita kaj sanktigita de la elprovado, vidas ĉesi siajn dolorajn enkarniĝojn. Ĝi forlasas por ĉiam la materiajn sferojn kaj leviĝas en la grandioza hierarkio de la feliĉaj mondoj, trapasante la senliman kampon de la spacoj kaj epokoj. Ĉiu venko super la pasioj, ĉiu paŝo antaŭen plivastigas ĝiajn horizontojn, plilarĝiĝas ĝian kampon de agado; ĝi komprenas, ĉiam pli kaj pli klare, la grandan harmonion de la leĝoj kaj aferoj, ilin partoprenante en pli intima kaj efektiva maniero. Tiam la tempo nuliĝas, la jarcentoj forflugas kvazaŭ sekundoj. Unuiĝante al siaj fratoj, kunuloj de la eterna vojaĝo, ĝi daŭre konstruas

sian intelektan kaj moralan progreson en la sino de ĉiam kreskanta lumo.

El niaj observadoj kaj esploroj eliĝas do unu granda leĝo: la plureco de ekzistadoj de la animo. Ni vivis antaŭ ol ni estis naskitaj, kaj ni pluvivos post la morto. Tiu leĝo liveras la ŝlosilon de ĝis nun nesolveblaj problemoj, ĉar ĝi sola klarigas la malegalecon de la vivkondiĉoj, la senfinan variecon de la kapabloj kaj karakteroj. Ni konis, aŭ certe iam konos, ĉiujn sinsekvajn stadiojn de la socia vivo; ĉiujn mediojn ni nepre travivos. En la pasinteco ni estis kiel la sovaĝuloj, loĝantaj en malprogresintaj regionoj; en la estonteco ni povos leviĝi al la alteco de la senmortaj genioj, de tiuj grandaj spiritoj, kiuj, kvazaŭ lumturoj, klarigas la vojon de la homaro. La historio de la homaro estas nia propra historio. Kun la homaro ni trapasis krutajn irejojn, elportis jarcentajn evoluojn, pri kiuj raportas la naciaj historioj. La tempo kaj la laboro: jen la elementoj de nia progreso.

Tiu leĝo pri la reenkarniĝo brile montras la superegan justecon, regantan super la estaĵoj. Niajn katenojn ni mem alterne forĝas kaj rompas. La teruraj provoj, kiujn certaj personoj elportas, estas la sekvo de ilia pasinta konduto. La despoto renaskiĝos kiel sklavo; la virino malhumila kaj fiera pri sia beleco loĝos en malsanema, suferema korpo; la mallaborulo fariĝos salajrulo, kurbigita sub sendanka laboro. Kiu suferigis, suferos siavice. Vane oni serĉas la inferon en nekonataj, malproksimaj regionoj; la infero estas en ni, troviĝas en la nekonataj kaŝanguloj de peka animo, kies dolorojn nur kulpelaĉeto povas ĉesigi. Ne estas eternaj punoj.

Sed, kelkaj diras, se la naskiĝon antaŭis aliaj ekzistadoj, kial ni ne rememoras ilin? Kiel ni profite elaĉetus forgesitajn kulpojn?

La memoro! Ĉu ĝi ne estus pli ĝuste peza ŝarĝo, ligita al niaj piedoj? Apenaŭ elirintaj el la epokoj de sovaĝeco kaj besteco, kia povis esti la pasinteco de ĉiu el ni? Tra la pasigitaj stadioj, kiom da sango kaj larmoj verŝiĝis pro ni! Ni spertis malamon kaj praktikis maljustecon. Kia morala ŝarĝo estus tiu longa perspektivo de kulpoj por spirito ankoraŭ febla kaj ŝanceliĝema!

Krom tio, ĉu la memoro pri nia pasinteco ne estas intime ligita al la memoro pri la pasinteco de aliaj homoj? Kia situacio tiu de la kulpulo poreterne montranta la brulstampon de siaj pekoj! Pro la sama kaŭzo, la malamo, la eraroj daŭrus senfine, estigante profundajn, senfinajn malpacojn en la sino de tiu jam multe suferinta homaro. Dio estas saĝa, forviŝante el niaj malfortaj cerboj la memoron pri timinda pasinteco. Trinkinte akvon de Leteo, ni renaskiĝas por nova ekzistado. Alia edukado kaj pli vasta civilizacio forpelas la ĥimerojn, kiuj iam hantis nian spiriton. Liberaj de tiu embarasa ŝarĝo, ni pli rapide antaŭeniras sur la vojo, kiu etendiĝas antaŭ ni.

Sed tiu pasinteco ne forviŝiĝis en tia maniero, ke ni ne povus vidi kelkajn postsignojn. Se, liberiĝinte el la eksteraj influoj, ni malsupreniros ĝis la fundo de nia memo; se ni skrupule analizos niajn inklinojn, niajn aspirojn, ni malkovros aferojn neniel klarigeblajn laŭ la vidpunkto de nia nuna ekzistado aŭ de nia edukado. Deirante de tiuj elementoj, ni povos rekonstrui tiun pasintecon, se ne detale, almenaŭ laŭ ĝiaj ĉefaj trajtoj. Kvankam dumtempe forviŝitaj el nia memoro, tiuj kulpoj, kuntrenantaj nepran elaĉeton en la nunan ekzistadon, tamen ne ĉesas ekzisti, almenaŭ en sia primara kaŭzo, nome en niaj pasioj kaj en nia ardanta karaktero, kiujn ni nepre devas bridi kaj korekti en novaj enkarniĝoj.

Tiamaniere, se ni lasas ĉe la vestibloj de la vivo la plej danĝerajn rememorojn, ni tamen kunportas en la

novan ekzistadon la fruktojn kaj sekvojn de la faritaj laboroj, nome konsciencon, juĝokapablon kaj karakterojn tiajn, kiajn ni mem formis. La denaskaj ideoj estas nenio alia ol intelekta kaj morala heredaĵo de niaj pasintaj ekzistadoj.

Kaj ĉiufoje, kiam malfermiĝas antaŭ ni la enirejo al la morto; kiam, libera el la materia jugo, nia animo forlasas la karnan maliberejon por eniri la mondon de la Spiritoj, tiam la tuta pasinteco iom post iom reaperas antaŭ niaj okuloj. Laŭ la irita vojo, ni revidas, unu post la alia, niajn ekzistadojn, niajn falojn, niajn haltojn, niajn hastajn iradojn. Kaj ĉe tiu taksado de la vojo, ni juĝas nin mem. Ĉe la vidado de niaj meritoj aŭ malmeritoj, ni trovas rekompencon aŭ punon.

Ĉar la celo de la vivo estas la intelekta kaj morala perfektiĝo de la estaĵo, kiu kondiĉo, kiu medio pli konvenus al ni por atingi tiun celon? La homo povas labori por sia perfektiĝo en iu ajn kondiĉo, en iu ajn socia medio; li tamen pli facile sukcesos, agante sub certaj kaj difinitaj kondiĉoj.

La riĉeco liveras al li potencajn studrimedojn; permesas al li havigi al sia Spirito pli vastan kaj riĉan kulturon; donas al li pli grandajn kapablojn por helpi siajn malfeliĉajn fratojn, por favori ilian destinon per faroj utilaj al ili. Sed estas malmultegaj tiuj personoj, kiuj opinias devon laboradi por mildigi la mizeron, instrui kaj plibonigi siajn similulojn.

La riĉeco plej ofte ŝtoniĝas la homan koron; ĝi estingas tiun internan flamon, tiun amon al la progreso kaj al la sociaj plibonigoj, kiu inspiras la noblajn animojn; ĝi intermetas baron inter la potencaj kaj la humilaj; ĝi igas la homon vivi en sfero ne atingebla por la nefavoritoj de la mondo kaj kie, sekve, iliaj bezonoj kaj suferoj estas nekonataj, ignorataj.

La mizero ankaŭ havas siajn terurajn danĝerojn: la malnobliĝon de la karakteroj, la malesperon, la memmortigon. Sed dum la riĉeco faras nin indiferentaj kaj egoismaj, la malriĉeco, nin proksimigante al la humilaj, faras, ke ni kompatu iliajn dolorojn. Estas necese, ke ni mem suferu, por ke ni povu taksi la suferojn de la aliaj. Dum la potenculoj, meze de siaj honoroj, ĵaluze klopodas konkuri inter si pri pompoj, la senhavuloj, unuiĝintaj pro la necesbezono, kelkfoje vivadas en kortuŝa kunfratiĝo.

Rigardu la birdojn en la vintraj monatoj, kiam la ĉielo estas malhela kaj la Tero kovrita per blanka, neĝa mantelo: grupiĝintaj sur tegmentrando, silente ili sin reciproke varmigas. Ilin unuigas komuna bezono. Sed jen revenas la belaj tagoj kun brilega suno kaj abundaj rikoltoj; tiam ili pepadas en reciproka spitado kaj ĉiuj persekutas, atakas, ŝiras unu la alian. Ankaŭ tia estas la homo. Dolĉa, afabla al siaj similuloj en la okazo de bezono, li preskaŭ ĉiam fariĝas indiferenta kaj malĝentila pro la posedo de la materiaj havaĵoj.

Modesta kondiĉo pli taŭgas al la spirito deziranta progresi kaj akiri la virtojn necesajn por sia morala plialtiĝo. For de la tumulto de la trompaj ĝuoj, li pli ĝuste taksos la vivon. El la materio li prenos ĉion necesan por la konservado de siaj organoj, sed li evitos fali sub la jugon de malutilaj kutimoj, sklaviĝi al multego da fikciaj bezonoj, kiuj ja estas la malfeliĉegoj de la homaro. Li estos sobra, laborema, kaj kontentigos sin per malmulto, preferante super ĉio la plezurojn de la intelekto kaj la ĝojojn de la koro.

Tiamaniere, fortikigita kontraŭ la atakoj de la materio, la saĝa homo, inspirita de la lumo de la prudento, vidos brilegi siajn destinojn. Komprenante pli bone la celon de la vivo kaj la kialon de la aferoj, li eltenos

la doloron firme kaj rezignacie; kaj la elprovadon li alfrontos kuraĝe, sciante, ke ĝi estas utila kaj ke nur ĝi povas elŝprucigi la galon, kiu estas en li. Se oni ridindigas lin kaj faras lin viktimo de maljusteco kaj intrigo, li lernos pacience elteni la suferojn, memorante siajn antaŭulon: Sokraton cikutvenenitan, Jesuon krucumitan, Johanan Dark ŝtiparumitan. Li konsoliĝos per la penso, ke estuloj pli altaj, pli virtaj, pli dignaj suferadis kaj mortis pro la homaro.

Fine, post faroplena ekzistado, kiam eksonos la solena horo, li akceptos la morton trankvile kaj sen bedaŭro; la morton, kiun la monduloj vestas per terurelvoka ceremoniaro; kiu plenigas per timego potenculojn kaj voluptamulojn, sed kiu por severmora pensulo estas nura liberiĝo, la horo de transformiĝo, la pordo kondukanta al la luma regno de la Spiritoj.

Serene li eniros tiun vestiblon de la transteraj regionon. Lia konscienco, liberiĝinta el la materiaj ombroj, stariĝos antaŭ li, kiel juĝisto, reprezentanto de Dio, kun la demando: Kion vi faris el la vivo? Kaj li respondos: Mi luktis, mi suferis, mi amis, mi instruis la bonon, la veron, la justecon, al miaj fratoj mi donis la ekzemplon de honesteco kaj dolĉeco; mi malŝarĝis la suferantojn kaj konsolis la plorantojn. Sed min juĝu la Eternulo, ĉar en Liaj manoj mi estas!...

VII

LA SUPEREGA CELO

Homo, frato mia, fidu vian destinon, ĉar ĝi estas grandioza. Vi naskiĝis kun nekulturitaj kapabloj, kun senlimaj aspiroj, kaj al vi estas donita la eterneco por disvolvi unujn kaj kontentigi la aliajn. Plialtiĝi tra la

sinsekvaj ekzistadoj, kleriĝi per la studado, plipuriĝi per la doloro, akiri ĉiam pli vastan sciencon, ĉiam pli noblajn kvalitojn: jen via destino. Dio ankoraŭ pli favoris vin: li havigis al vi la rimedojn, por ke vi kunlaboru en lia verko, partoprenu en la leĝo de la senfina progreso, malfermante novajn vojojn al viaj similuloj, plialtigante viajn fratojn, ilin altirante al vi, ilin inicante en la brilegecon de vero kaj bono kaj en la sublimajn harmoniojn de l' Universo. Ĉu la progresigo de la animoj kaj la mondoj ne estas la efektivigo de la dia verko? Ĉu tiu giganta, ĝuoplena laboro ne estas preferinda al ripozo teda kaj senfrukta? Kunlabori kun Dio! En ĉio kaj ĉie realigi la bonon kaj la justecon! Kio pli granda, pli nobla povas ekzisti por via senmorta spirito?!

Levu do vian rigardon kaj ĉirkaŭprenu la vastajn perspektivojn de via estonteco! Ĉerpu el tiu spektaklo la energion necesan por alfronti la mondajn ventegojn kaj uraganojn. Marŝu, brava batatalanto! Transgrimpu la krutaĵojn, kiuj kondukas al tiuj suproj nomataj virto, devo, sinofero! Ne haltu survoje, deŝirante floretojn el la arbustoj aŭ distriĝante per orkoloraj ŝtonetoj. Antaŭen, ĉiam antaŭen!

Ĉu vi vidas, en la plej belaj ĉieloj, tiujn lumegajn astrojn, tiujn sennombrajn sunojn, kiuj trenas, en sia rondiro, miregindajn sekvantarojn el brilaj planedoj? Kiom da sinsekvaj jarcentoj estis necesaj por ilia formiĝo! Kiom da jarcentoj ankoraŭ forpasos ĝis ilia dissolviĝo! Nu bone, venos iam la tago, kiam ĉiuj tiuj fokusoj estingiĝos, kiam tiuj gigantaj mondoj malaperos por cedi lokon al novaj sferoj, al novaj familioj de astroj, eliĝontaj el la abismaj profundaĵoj. Kion vi vidas hodiaŭ, tio ne longe daŭros. La blovo de la spacoj forbalaos por ĉiam la polvon de tiuj elĉerpitaj mondoj; sed vi, homa spirito, vi ĉiam vivos, daŭrigante la eternan vojaĝon en

la sino de senĉese renoviĝanta kreitaro. Kion do signifos, por via animo purigita kaj plialtiĝinta, la ombroj kaj la zorgoj de la nuntempo? Tiuj nedaŭraj survojaj akcidentoj restigos en la spirito nur dolĉajn aŭ maldolĉajn rememorojn. Antaŭ la senfinaj horizontoj de la senmorteco, la malbonoj de la nuntempo kaj la elportitaj suferoj estos kiel pasema nebulo sur serena ĉielo.

Vi do konsideru la surterajn aferojn laŭ ties ĝusta valoro. Certe ne kun malŝato, ĉar ili estas bezonaj por via progreso kaj via misio estas kunlabori por ilia plibonigo, mem plibonigante vin; sed ne al ili ekskluzive vi alkroĉu vian animon; antaŭ ĉio profitu el la lecionoj, kiujn ili enhavas. Ili instruos al vi, ke la celo de la vivo ne estas ĝuoj kaj plezuroj, sed ja per laborado, studado kaj plenumado de la devoj, la disvolviĝo de via animo, de tiu estaĵo, kiun vi renkontos en la transtombo tia, kia vi ĝin faris dum la surtera ekzistado.

VIII

EKSPERIMENTAJ PRUVOJ

La ĵus donita solvo de la problemoj de l' vivo baziĝas sur la plej rigora logiko. Ĝi estas tiel konforma al la kredoj de la plej altaj genioj de la antikveco, al la instruoj de Sokrato, Platono kaj Origeno, kiel ankaŭ al tiuj de la Druidoj, kies profundaj doktrinoj, rearanĝitaj de la Historio post dudek jarcentoj, hodiaŭ ravas la homan spiriton. Tiu solvo estas esenca parto de la filozofioj de l' Oriento kaj inspiris verkojn kaj farojn sublimajn. El ĝi la Galloj ĉerpis sian nevenkeblan kuraĝon, la maltimon kontraŭ la morto. En la nuna epoko tiu solvo estas akceptita de Jean Reynaud, Henri Martin, Esquiros, Pierre Leroux, Vitor Hugo, k.a.

Sed malgraŭ ĝia absolute racia karaktero kaj la aŭtoritateco de la tradicioj, sur kiuj ĝi baziĝas, tiu solvo estus kvalifikita, kiel pura hipotezo, apartenanta al la regno de la imago, se ni ne povus starigi ĝin sur neskuebla bazo, sur senperaj eksperimentoj, senteblaj kaj atingeblaj por ĉiuj.

Laca de la teorioj kaj sistemoj la homa spirito ĉe ĉiu nova aserto postulas pruvojn. Kaj tiujn pruvojn de la ekzistado kaj senmorteco de la animo la eksperimenta spiritualismo prezentas al ni materiaj, evidentaj. Sufiĉas al ni senpartie kaj serioze observadi, persiste studadi tiujn fenomenojn nomatajn spiritismaj, por ke ni konvinkiĝu pri ilia realeco kaj graveco, por ke ni komprenu iliajn grandegajn sekvojn el la vidpunkto de la sociaj transformiĝoj, ĉar ili portas pozitivan bazon, solidan apogon al la moralaj leĝoj, al la idealo de justeco, sen kio nenia civilizacio povus disvolviĝi.

La animoj de la mortintoj sin malkaŝas al la homoj. Ili manifestas sian ĉeeston, interparolas kun ni, inicas nin en la sekretojn de la renoviĝantaj ekzistadoj, en la brilegecon de tiu estonteco, kiu ja estos nia estonteco.

Jen fakto reala, tro malmulte konata kaj tro ofte neata. La eksperimentojn de la nova spiritualismo oni renkontis kun sarkasmo, kaj ĉiujn, kiuj, malgraŭ tio, okupiĝis pri ĝi, oni mokadis, ridindigis kaj rigardadis, kiel frenezulojn.

Tia estis, en ĉiuj epokoj, la destino de la novaj ideoj, la akcepto de la grandaj eltrovoj. Multaj rigardas, kiel banalaĵojn, la turniĝadon de la tabloj; sed la plej gravaj leĝoj de l' Universo, la plej potencaj fortoj de la Naturo ne koniĝis en pli digna maniero. Ĉu oni ne malkovris la elektron dank'al eksperimentado kun ranoj? La falo de pomo elmontris la universalan altiron, kaj kaserola bolado evidentigis la efikon de vaporo. Koncerne la

fakton, ke oni moknomas ilin frenezuloj, la spiritistoj ĉi-rilate estas sortokunuloj de Salomono el Caus, de Harvey, de Galvani kaj multaj aliaj genioj.

Notinda afero: la plejmulto el la pasiaj kritikantoj de la fenomenoj aŭ ne observadis nek studadis ilin, aŭ tion faris tre supraĵe, dum al la nombro de tiuj, kiuj ilin konas kaj asertas ilian ekziston, estas alkalkulitaj la plej grandaj scienculoj de la nuntempo. Ili estas inter aliaj: en Anglujo, William Crookes, membro de la Reĝa Londona Societo, eminenta fizikisto, al kiu oni ŝuldas la eltrovon de la radianta materio; Russel Wallace, rivalo de Darwin; Varley, telegrafia ĉefinĝeniero; F. Myers, prezidanto de la **Societo por Psikaj Esploroj**; O. Lodge, rektoro de la universitato de Birmingham; en Usono, la juristo Edmonds, prezidanto de la Senato; kaj profesoro Mapes, de la Nacia Akademio; en Germanujo, la astronomo Zöllner kaj la profesoroj ĉe la Universitato de Leipzig, Ulrici Weber kaj Dechner; en Francujo, Camille Flammarion, D-ro Paul Gibier, disĉiplo de Pasteur, krom Vacquerie, Eugène Nus, C. Fauvety, Kolonelo de Rochas, profesoro Charles Richet, membro de la Instituto, doktoro Maxwell, ĉefprokuroro ĉe la Apelacia Kortumo de Bordo, k.c. En Italujo, la fama profesoro Lombroso, kiu post longtempa neado de la ebleco de la spiritismaj faktoj, studis la fenomenojn kaj fine publike konfesis ilian realecon. Ĉe tio, ni petas, ke oni diru al ni kiuflanke troviĝas la garantioj de fidinda ekzameno kaj serioza konsiderado. Al tiuj, kiuj neadis la movon de la Tero, Galilejo respondis: **“E pur si muove!”** [(*)] Kaj Crookes tiel opinias pri la spiritismaj faktoj: **“Mi ne diras, ke tio estas ebla, mi asertas, ke tio estas reala.”** La vero, komence rigardata kiel utopio, fine ĉiam venkas.

[(*)] Sed tamen ĝi moviĝas! – **La trad.**

Ni ankaŭ konstatas, ke senteble ŝanĝiĝas la gazetara sinteno rilate al la fenomenoj. Oni ne plu mokas nek ridindigas. Oni komprenas, ke en tio estas io grava. La grandaj parizaj gazetoj, kiel **Figaro, Le Matin, L' Éclair, Le Journal, Le Petit Parisien,** k. a. ofte publikigas seriozajn artikolojn pri la temo. La doktrino pri la eksperimenta spiritismo disvastiĝas en la mondo kun mirinda rapideco. En Usono ĝiaj adeptoj kalkuliĝas per miloj; la Okcidenta Eŭropo estas inicita pri ĝi, kaj en la plej malproksimaj centroj, en Hispanujo, en Rusujo fondiĝas societoj de esploroj kaj aperas multenombraj eldonaĵoj. Kun ŝtata helpo estas fondita en Parizo metapsikia instituto por la studado de tiuj faktoj.

Por la efektivigo de la spiritismaj fenomenoj estas nepre necesa la kunhelpo de certaj speciale dotitaj personoj. La Spiritoj ne povas agi sur la materiajn korpojn kaj tuŝi niajn sentumojn sen ia provizo da vivo-fluidaĵo, kiun ili ĉerpas el certaj personoj nomataj **mediumoj**. Ĉiuj homoj rudimente posedas la mediuman kapablon, kiu elvolviĝas per laborado kaj ekzercado.

La animo, en sia transtomba ekzistado, ne malhavas ian formon. Ĝi posedas fluidecan korpon el vaporeca, kvintesenca materio, kiu alprenas ĉiujn aspektoj de la homa korpo kaj kiu nomiĝas **perispirito**. Tiu **perispirito** aŭ fluideca korpo antaŭekzistas kaj postvivas la materian korpon, de kiu ĝi estas samtempe skizo, modelo kaj motoro. Ĝi formas subtilan organismon, kaj ĝuste per ĝia agado sur la vivo-fluidaĵon de la mediumoj la Spirito manifestiĝas al la homoj, aŭdiĝas frapojn, movas objektojn, korespondas kun ni per interkonsentita signaro. En certaj okazoj ĝi povas fariĝi videbla, tuŝebla, produkti la senperan skribadon, dikti mesaĝojn kaj eĉ lasi premsignojn kaj muldaĵojn de sia materiiĝinta envolvaĵo.

Ĉiuj tiuj faktoj estis multfoje observataj de la supre cititaj sciencistoj kaj de personoj de ĉiuj klasoj, aĝoj kaj landoj. Ili eksperimente pruvas la ekzistadon, ĉirkaŭ ni, de nevidebla mondo, loĝata de la animoj forlasintaj la Teron, inter kiuj troviĝas tiuj estuloj, kiujn ni konis kaj amis, kaj al kiuj ni iam alkolektiĝos. Ĝuste tiuj animoj instruas al ni la konsolan kaj grandiozan filozofion, kies ĉefajn trajtojn ni skizis ĉi-supre.

Kaj estas notinde, ke tiuj manifestiĝoj ĉiam ekzistis. Kontinuaj rilatoj unuigas la mondon de la Spiritoj al la mondo de la vivantoj. Pri tio ni trovas apogon ĉe la Historio. La apero de Samuel al Saul, la familiara Genio de Sokrato, tiuj de Tasso kaj Hieronimo de Cardan, la voĉoj de Johana Dark kaj multaj aliaj similaj faktoj fontas el la samaj kaŭzoj. Sed kio estis iam rigardata kiel supernatura, tio hodiaŭ montriĝas kiel havanta racian karakteron, kiel kolekto da faktoj regataj de rigoraj leĝoj, kies studado naskas ĉe ni profundan kaj klaran konvinkiĝon.

La nevidebla mondo estas ne pli ol kontinuaĵo de la mondo videbla. Trans la limoj de niaj sentumoj troviĝas formoj de la materio kaj de la vivo, kies ekzisto estas ĉiam pli kaj pli akceptata de la Scienco, depost kiam tute nekonata regiono de la Naturo estis al ĝi malfermita per la elkovro de la radianta materio, per la aplikado de la ikso-radioj, per la esploroj de Hertz pri la senfadena telegrafio, per tiuj de Lockyer pri la nebulozoj, kaj de Becquerel, Curie kaj Lebon pri la radioaktiveco.

Oni klare vidas, ke tiuj faktoj konsistigas tute ne malŝatindan aferon, sed ja unu el la plej grandaj intelektaj kaj moralaj revolucioj, kiuj iam fariĝis en la historio de nia mondo. Ili estas la plej serioza argumento, kiun oni povus starigi kontraŭ materialismo. La certeco,

ke ni daŭre vivos transtombe, en la pleneco de niaj fakultoj kaj de nia konscienco, faras, ke la morto ne plu estu kaŭzo de timo. La konado de la feliĉaj aŭ malfeliĉaj situacioj, en kiuj la Spiritoj enfalis pro siaj bonaj aŭ malbonaj faroj, liveras potencan moralan sankcion. La perspektivo de la senfinaj progresoj kaj intelektaj akiroj, kiuj atendas ĉiujn estulojn kaj ilin kondukas al komunaj destinoj, nepre alproksimiĝas kaj unuiĝos la homojn per la ligiloj de la frateco. La doktrino de la eksperimenta spiritualismo estas la sola pozitiva filozofio, kiu respondas al la moralaj bezonoj de la homaro.

IX

RESUMO KAJ KONKLUDO

Resume, la principoj, kiuj rezultas el la nova spiritualismo – principoj instruataj de elkarniĝintaj Spiritoj, kiuj do troviĝas en pli bonaj kondiĉoj ol ni por distingi la veron – estas jenaj:

Ekzisto de Dio, direktanta intelekto, vivanta leĝo, animo de l' Universo, superega unuo, kie finiĝas kaj harmonias ĉiuj rilatoj, grandega fokuso de la perfektaĵoj, de kie disradias kaj disvastiĝas en la senfino ĉiuj moralaj potencoj: Justeco, Saĝo, Amo!

Senmorteco de la animo, spirita esenco portanta en si la ĝermon de ĉiuj fakultoj, ĉiuj potencoj, kiujn ĝi devas disvolvi per siaj laboroj, enkarniĝante en materiaj mondoj, altiĝante tra sennombraj kaj sinsekvaj ekzistadoj, grado post grado, ĝis la perfekteco.

Komunikiĝo inter la vivantoj kaj la mortintoj; reciproka agado de unuj sur la aliajn; konstanteco de la rilatoj inter ambaŭ mondoj; solidareco inter ĉiuj estuloj,

identaj laŭ sia origino kaj diferencaj nur per siaj provizoraj situacioj: unuj, kiel Spiritoj, liberaj en la spaco, aliaj, portantaj pereeman envolvaĵon; ĉiuj tamen alterne pasas de unu stato al alia, kaj la morto estas nenio alia ol tempo de ripozo inter du surteraj ekzistadoj.

Senfina progreso, eterna justeco, morala sankcio; la animo, respondeca kaj libera en sia agado, – mem konstruas sian estontecon; laŭ ĝia morala stato, la fluidaĵoj, maldelikataj aŭ subtilaj, kiuj konsistigas ĝian perispiriton, kaj kiujn ĝi altiras al si pro siaj kutimoj kaj inklinoj, – tiuj fluidaĵoj, submetataj al la universala leĝo de altiro kaj gravito, ĝin trenas al tiuj malsuperaj sferoj, al tiuj mondoj de doloro, kie ĝi suferas, elaĉetas, elpagas la pasintecon, aŭ ĝin kondukas al tiuj feliĉaj sferoj, kie la materio estas malpli potenca, kie regas harmonio kaj feliĉo; la animo, en sia vivo supera kaj perfekta, kunlaboras kun Dio, formas la mondojn, direktas ties evoluadon, prizorgas la progreson de la homaroj kaj la plenumadon de la eternaj leĝoj.

Tiaj estas la instruoj de la eksperimenta Spiritualismo. Ili estas ne aliaj ol tiuj de la primitiva Kristanismo, liberigita je la formoj de la materia kulto, sen tiuj dogmoj, falsaj interpretadoj kaj eraroj, per kiuj la homoj vualis kaj aliŝanĝis la filozofion de la Kristo.

Malkaŝante la ekziston de mondo nekonata, nevidebla, sed tiel reala, tiel viva, kiel la nia, la nova doktrino malfermas por la penso de la homo horizontojn, antaŭ kiuj li, konfuzita kaj mirigita, ankoraŭ ŝanceliĝas. Sed la rilatoj, kiujn tiu ĉi revelacio ebligas inter la vivantoj kaj la mortintoj, la konsolo kaj kuraĝigoj, kiuj rezultas el tiuj rilatoj, la certeco, ke ni revidos ĉiujn, kiujn ni supozis perdiĝintaj por ĉiam, ke el tiuj ni ricevas la superegajn instruojn, ĉio ĉi konsistigas komplekson da fortoj,

da moralaj rimedoj, kiujn la homo ne povas malatenti aŭ malŝati senpune.

Sed, malgraŭ ĝia granda valoro, la nuntempa homo, profunde skeptika, penetrita de antaŭjuĝoj, ne konsiderus tiun doktrinon grava, se la faktoj ne konfirmus ĝin. Por skui la homan spiriton, supraĵan kaj indiferentan, estis necesaj la materiaj, bruegaj manifestiĝoj. Jen kial, ĉirkaŭ la jaro 1850, en malsamaj medioj, ĉiaspecaj mebloj estis skuataj, frapoj sonoris ĉe la muroj, pezaj korpoj delokiĝis, kontraŭstarante la konatajn leĝojn de la Fiziko; sed post tiu kruda, komenca fazo, la spiritismaj fenomenoj fariĝis pli kaj pli inteligentaj. La psikaj faktoj (el la greka **psyché**, animo) postvenis la fizikajn manifestiĝojn; tiam ekaperis la mediumoj skribivaj, parolivaj, somnambulaj kaj sanigivaj, ricevantaj, mekanike aŭ intuicie, inspirojn, kies kaŭzoj troviĝis ekster ili; okazis videblaj kaj tuŝeblaj aperoj, kaj la ekzisto de la Spiritoj fariĝis afero nerefutebla por ĉiuj observantoj, kiuj ne estis blindigitaj de la antaŭjuĝoj.

Tiel aperis al la homaro la nova kredo, bazita unuflanke sur la tradicioj de la pasinteco, sur la universaleco de la principoj, kiuj troviĝas en la origino de ĉiuj religioj kaj de la plimulto el filozofioj; aliflanke, sur la multenombraj psikologiaj pruvoj kaj sur la faktoj observataj de ĉiurangaj personoj en ĉiuj landoj.

Afero notinda: tiu scienco, tiu nova filozofio, simpla kaj alirebla por ĉiuj, libera je ĉiuj ceremonioj kaj formoj de kulto, aperas ja en oportuna tempo, kiam la malnovaj kredoj malfortiĝas kaj ruiniĝas, kiam sensualismo disvastiĝas, kiel senlima plago, kiam malnobliĝas la moroj kaj senfortiĝas la sociaj ligiloj, kiam la malnova mondo erarvagas en aventuroj, sen brido, sen idealo, sen morala leĝo, kiel drivanta senrudra ŝipo.

Ĉiu serioza observanto ne povas kaŝi al si, ke timindan krizon trapasas la hodiaŭa socio, kiun surde korodas profunda putriĝo. Profitamo kaj ĝuavido fariĝas kun ĉiu tago pli akutaj, pli ardaj. Oni deziras posedi je ĉia ajn kosto. Ĉiaj rimedoj estas bonaj, por ke oni atingu bonstaton, riĉecon, kaj tion oni opinias la sola celo inda je la vivo. Tiaj aspiroj nur povos havi kiel sekvon la neflekseblan egoismon de la feliĉuloj kaj la malamon kaj malesperon de l' malfeliĉuloj. Dolora estas la situacio de la malgrandaj kaj malriĉaj, kiuj, preskaŭ ĉiam ĵetitaj en tiun moralan mallumon, kie ne vidiĝas ia konsolo, serĉas en memmortigo la finon por siaj malbonoj. La nombro de la memmortigoj, kiuj en la jaro 1830, nur en Francujo, estis 1500, progresive kreskis ĝis la nuna kvanto de pli ol 8000.

La spektaklo de la sociaj malegalecoj, la suferoj de unuj kontraste kun la ŝajna feliĉo, la voluptaj plezuroj, la indiferenteco de aliaj; tiu spektaklo ekscitas ardan malamon ĉe la koro de l' neniohavuloj. La postulado de la materiaj havaĵoj jam fariĝas pli intensa. Nur organiziĝu kaj leviĝu tiuj grandegaj homamasoj kaj la Malnova Mondo povos esti skuata de teruraj revoluciaj renversegoj.

La Scienco estas senpova por deturni la malbonon, levi la karakterojn, resanigi la vundojn de la vivobatalantoj. Vere la nuntempaj sciencoj nur pritraktas suprajajn aspektojn de la Naturo, kunigante faktojn, donante al la homa spirito tutaĵon da scioj pri sia propra objekto. Tiamaniere la fizikaj sciencoj eksterordinare riĉiĝis de antaŭ duonjarcento, sed tiuj disaj laboroj estas mankhavaj laŭ interligiteco, unueco kaj harmonio. La vera scienco, nome tiu, kiu, el la aro de la faktoj, devas reiri al ilia kaŭzo, ligi, unuigi la diversajn sciencojn en unu majestan, grandiozan sintezon, el kiu naskiĝu ĝe-

nerala konceptado pri la vivo, estu difinitaj niaj destinoj, rezultu morala leĝo kaj bazo por socia pliboniĝo, tiu universala kaj nepre necesa scienco ankoraŭ ne ekzistas.

Se la religioj agonias, se forpasas la malnova kredo, se la Scienco montras sin senpova por liveri al la homo la necesan idealon, por gvidi lian marŝon kaj plibonigi la socion, ĉu tial devos ĉio resti en malespera situacio?

Ne; ĉar doktrino de paco, frateco kaj progreso venas sur ĉi tiun konfuzitan mondon por kvietigi la sovaĝajn malamojn, moderigi la pasiojn, al ĉiuj instrui la solidarecon, la pardonon, la bonecon.

Al la Scienco ĝi liveras tiun deziratan sintezon, sen kiu la Scienco por ĉiam restas senfrukta. Ĝi triumfas super la morto kaj malfermas por la Spirito, trans ĉi tiu vivo de provoj kaj suferoj, la brilegajn perspektivojn de senlima progresado en la senmorteco.

Al ĉiuj ĝi diras: Venu al mi kaj mi revigligos vin, mi konsolos vin, mi faros al vi la vivon pli dolĉa, la kuraĝon kaj la paciencon pli facilaj, la provojn pli elteneblaj. Ian malluman kaj serpentan vojon mi heligos per potenca lumo. Al la suferantoj mi donas la esperon; al la serĉantoj mi liveras la lumon; al tiuj, kiuj dubas kaj malesperas, mi havigas la certecon kaj la fidon.

Al ĉiuj ĝi diras: Estu fratoj, helpu vin unuj aliajn, subtenu vin reciproke en via kolektiva irado. Via celo estas pli nobla ol la celo de ĉi tiu materia kaj pasema vivo, ĉar ĝi konsistas en tiu spirita estonteco, kium vin ĉiujn kunigos, kiel anojn de unu sola familio, ŝirmitajn kontraŭ ĉagrenoj, bezonoj kaj sennombraj malbonoj. Penu ĝin meriti per viaj klopodoj kaj loboroj!

Kiam tiu doktrino, neelĉerpebla fonto de konsoloj, estos komprenata kaj praktikata, tiam la homaro estos granda kaj forta. Estingiĝos la malamo kaj la envio.

La potenculo, sciante, ke li jam estis malforta kaj povas denove esti tia, ke sian riĉecon li devas rigardi, kiel prunton de la komuna Patro, ja fariĝos pli karitema, pli afabla al siaj malfeliĉaj fratoj. La Scienco, kompletigita, fekundigita de la nova filozofio, forpelos superstiĉon kaj mallumon. Ne plu ekzistos ateistoj aŭ skeptikuloj. Tiam kredo simpla, grandioza, frateca, etendiĝos super la nacioj kaj ĉesigos la resentojn, la profundajn malamikecojn. La Tero, libera je la ĝin konsumantaj malfeliĉegoj, daŭrigos sian moralan supreniron kaj altiĝos je plia grado en la hierarkio de la mondoj.

SPIRITISMAJ LIBROJ EN ESPERANTO

Ago kaj Reago
Antaŭ du mil jaroj
Ĉielo kaj la Infero (La)
En Ombro kaj en Lumo
En pli Granda Mondo
Evangelio laŭ Spiritismo (La)
Feliĉaj la Simplaj
Filigranoj el Lumo
Homeopatio kaj Spiritismo
Katalogo de Spiritismaj Libroj en Esperanto
Kialo de l' Vivo (La)
Iŝmael Gomes Braga
Kio estas Spiritismo?
Konsolanto (La)
Kristana Agendo
Libro de la Mediumoj (La)
Libro de la Spiritoj (La)
Malbona Lupo Reenkarniĝinta
Mediuma Poemaro
Nia Hejmo
Paŭlo kaj Stefano
Sur la Vojo al la Lumo
Turmentego de la Memmortigintoj (La)
Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo

Krom tiuj, la brazila Spiritisma Federacio ankaŭ eldonis la senmortan "Bhagavad-Gitâ", tradukitan de Francisco Valdomiro Lorenz el la sanskrita originalo.

Mendu ĉe la Eldonejo, ĉe la Libroservo de Universala Esperanto-Asocio aŭ ĉe vialanda libroservo.

BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO
SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte
Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030